

3

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk

Fondita 1952


Numero 3

Junio/Julio/Aŭgusto 1978



ROMO

13-20 majo 1978



Domus Pacis

la kongresejo de la 30a IFEFEF-Kongreso kun la Esperantoflago kaj la flagoj de la partoprenantaj nacioj

30. Verbandskongreß in Rom

Unter der Schirmherrschaft der FISAIC trafen sich vom 13. bis 20. Mai 1978 in der italienischen Metropole 350 Eisenbahner-Esperantisten aus 18 Ländern zu ihrem diesjährigen Kongreß. Bei der feierlichen Eröffnung im Haus Domus Pacis, in dem auch die meisten Teilnehmer untergebracht waren, fand Herr Knop, Generalsekretär der FISAIC auch namens des BSW-Hauptvorstandes, lobende Worte für die völkerverbindenden Bemühungen, mit Esperanto die Sprachgrenzen zu überwinden und persönliche Freundschaften zu schließen. Der Eröffnung wohnten namhafte Vertreter des öffentlichen Lebens, der Generaldirektion der Italienischen Staatsbahnen, der Freizeitorganisation Dopolavoro Ferroviario sowie der Gewerkschaften bei. Mit besonderem Beifall wurden die Vertreter des

japanischen Landesverbandes bedacht. Auf einer Reihe von Arbeitssitzungen wurden fachliche und organisatorische Fragen behandelt. Thema des Fachvortrages war die Schnellbahnstrecke Florenz — Rom. Der Verbandsvorstand, an der Spitze Herr Joachim Gießner / Bf Herzberg (Harz) wurde für weitere zwei Jahre im Amt bestätigt.

Die Sehenswürdigkeiten der Ewigen Stadt, des Vatikanstaates, der Albaner Berge sowie etruskische Geschichtsstätten waren Ziele mehrer Busfahrten. Viele machten von dem Angebot Gebrauch, anschließend eine mehrtägige Fahrt nach Neapel und Pompeji zu unternehmen. Der nächste Kongreß wird im Juni 1979 in Turku/Finnland gleichzeitig mit einer Konferenz der FISAIC stattfinden.

W. B.

Auszug aus der Grußansprache des Generalsekretärs der FISAIC, Friedrich Knop, bei der Eröffnung des 30. IFEF-Kongresses in Rom 14. 5. 1978

Einst war das Latein die Sprache, die für eine Elite von Menschen als Verbindungsmittel diente. Aber Dr. Zamenhof stellte fest, daß es zu kompliziert sei, um allgemein als moderne Verbindungssprache geeignet zu sein. Das Fehlen einer internationalen Sprache kann man klar im Tourismus beobachten, wo es zur Isolierung und auch Arroganz der Touristen beiträgt.

Die Ziele der IFEF und FISAIC haben viel Gemeinsames. Deshalb würde ich mich gern mit Esperanto beschäftigen. Ich überbringe hier die Grüße des Generalpräsidenten der FISAIC, Dr. Emile Schlessler, und die des deutschen Bundesbahn-Sozialwerks. Während der nächsten Tage möchte ich die Arbeitsmethoden des Kongresses kennen lernen.

IFEF hat eine besondere Stellung in der FISAIC. Dabei spielt nicht so sehr die Mitgliederzahl eine Rolle als vielmehr der Unternehmungsgeist. Die Eisenbahner-Esperantisten haben die FISAIC mit ins Leben gerufen und waren bei der Gründungsversammlung vor 25 Jahren dabei.

La fenomeno VARBADO — meditaĵoj

- Varbado estas kvazaŭ alumeto: Frotu modeste — ĝi ne ekflamiĝas. Frotu forte — vi bruligas viajn fingrojn.
- Inteligentulon oni devas konvinki — stultulon persvadi.
- Esperanto-varbado estas io bela — kondiĉe oni ne ekscesas.
- Kial iri rektan vojon? — ekzistas ja tiom da agrablaj kromvojoj. Hg

La normigo de la veturilmaterialo en la kadro de UIC

Ekde kiam ekzistas fervojoj, oni ankaŭ internacie klopodas formi unuecan veturilmaterialon por ebligi per tio la transiron de la veturiloj al eksterlandaj retoj. Novan prosperon havis tiuj klopodoj post la lasta milito, kiam temis krom la simpligo de la trafiko pri la normigo de veturiloj por kontentigi pli bone la postulojn de la klientoj kaj por havigi kaj prizorgi pli ekonomie la stokon de veturiloj. Konforme al tiu situacio la UIC-komisiono „Veturiloj kaj Trakcio“ jam en 1974 modifis la koncernajn taskojn.

Lumbildoj pri Japanio

Okaze de la 30a IFEF-kongreso en Romo la japanaj kolegoj montris vere impresivajn diapozitivojn pri la japanaj ŝtatfervojoj kaj precipe pri siaj laborlokoj.

30a IFEF-Kongreso en la itala metropolo

De la 13a ĝis la 20a de Majo 1978 la itala metropolo Romo gastigis 350 fervojistojn el 18 landoj, inter ili pli ol 80 germanoj, okaze de la 30a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). La kongreso, kiu staris sub la aŭspicio de la Internacia Federacio de kulturfliegantaj fervojistoj (FISAIC), trovis fortan atenton ĉe publikaj, fervojaj kaj sindikataj instancoj. Jen la raporto de partopreninto.

Uverturo

Kiu ekvojaĝis en Germanio al Italio, renkontis la unuajn malfacilaĵojn: trajnojn malfruigintajn kaj plenplenajn pro festotagoj kaj balotoj, krome pluvegon.. Cetere malfruoj estis oftaj dum la kongresaj tagoj. Kelkaj kongresanoj perdis monon kaj aliajn objektojn fare de ŝtelistoj surstrataj, sed la plej multaj ĝuis depost la alveno en la giganta stacio Romo Termini ĝis la reveturo sunoplenajn, travivaĵriĉajn tagojn. Al tio kontribuis someriganta klimato kaj la komuna loĝigo en la pilgrima domaro „Domus Pacis“, situanta en parko kelkajn kilometrojn for de la urbocentro. Por superi la distancon al la vidinaĵoj la individue vagantaj kongresanoj postĉasis monerojn de 50 aŭ 100 liroj, kiuj pro nekonataj kaŭzoj estis raraj siatempe.



Domus Pacis

Inaŭguro

Sabaton, la 30an de Majo, oni renkontiĝis kiel kutime post la vespermanĝo por konatiĝi aŭ pli bone por saluti siajn konatulojn kaj geamikojn, ĉar la plej multaj jam konas sin depost jaroj. La dimanĉo komenciĝis per deservo en la apuda kapelo. En la granda salono ornamita per flagoj kaj surskriboj kolektiĝis poste pli ol 350 esperantistoj kaj honoraj gastoj, kiujn salutis LKK-prezidanto d-ro Alberto Menabene. Flanke de FISAIC esprimis s-ro Friedrich Knop kiel ties sekretario sian estimon kaj ĝojon pri la laboro de la fervojistoj esperantistaj kaj

anoncis, ke la kompleta estraro de FISAIC okazigos sian venontjaran labor-kunsidon samtempe kaj samloke kiel la IFEF-kongreso 1979.

Krome salutis la kongreson

d-ro Mario Cavani, prezidanto de la Postlabora Fervojista Organizo en Romo, senatano Alberto del Nero, prezidanto de la interparlamentara grupo „Amikoj de Esperanto“, d-ro Giovanni Romano, ĉefo de la centra oficejo de la Postlabora Fervojista Organizo, d-ro Francesco Monopoli, reprezentanto de la ĝenerala direkcio de la Ŝtataj Fervojoj (FS), d-ro Alberto Ciambricco, direktoro de la fervoja revuo „Voci della Rotaia“.

Antaŭ la paŭzo ludis ĉarma infanensemblo de elementa lernejo en Cesena teatraĵon, en kiu reĝino de fantazia lando scipovis solvi la lingvan problemon pere de Esperanto — por IFEF-kongreso nekutima kompletigo de inaŭgura ceremonio. Sekvis salutvortoj de prof-ino Michelotti, reprezentantino de la Respubliko de San Marino, kaj de s-ino Ada Fighiera, la redaktorino de „Heroldo de Esperanto“. Kun atento estas registritaj la salutoj de la landaj delegitoj kaj forte aplaŭditaj tiuj de Japanio, reprezentita unuafoje en IFEF-kongreso. IFEF-prezidanto Joachim Gießner akcentis la valoron kaj neceson de la Internacia Lingvo ankaŭ sur la fervoja medio kaj malfermis la kongreson.

Fakaj laboroj

Kongresoj de IFEF ne estas imageblaj sen fakaj laboroj. Menciinda estas unue la aktiveco de la Terminara Komisiono, kiu kunvenis trifoje (15., 16., 19.5.). La komisionanoj aktualigis la staton de la faritaj laboroj kaj interkonsentis pri la komunaj laboroj venontjaraj. La ĉefa tasko konsistas el la traduko de la baza laborlibro, la fervojfaka leksikono (2a eldono) de la Unio Internacia de la Fervojoj (UIC). Oni fintraktis fakajn terminojn, pri kiuj skribe oni ne povis interkonsenti pro diversaj tradukproponoj.

Laŭ informo de la japanaj kolegoj la Japanaj Ŝtatejoj kreis propran eldonon de la UIC-leksikono anstataŭante la nederlandan lingvon per la japana. La kunsido de la Fakprelega Komisiono (15.5.) okupiĝis krom pri la pasinta periodo ankaŭ pri la tiujara kaj la venonta fakprelega laboro. Ŝajnas ke la kunlaboro, preskribita per la statuto, inter LKK kaj la komisiono ne kontentigas ĉiurilate. Kulmino de la faka laboro estis la fakprelego (17.5.), kies temo estis „La rekta fervojo inter Romo kaj Florenco“. (La kompleta teksto troviĝos en „Internacia Fervojisto“, ekstrakto en tiu ĉi numero). Al germanaj kongresanoj tiu temo estis aparte aktuala pro la projektitaj rapidlinioj, ekz. inter Hannover kaj Gemünden. La fakprelegon akompanis cetere sonfilmoj de la FS. Sufiĉan intereson trovis la forumo, kiun partoprenis flanke de la fervojista sindikato SAUFI s-ro Sante Bianchini. Tiu sindikato intencas starigi la lingvan problemon ĉe la Internacia Federacio de la Laboristoj por Transportoj (ITF) kaj subteni la adopton de Esperanto.

Organizaj aferoj

Ke IFEF ne povas ripozi sur antaŭaj sukcesoj, pruvis tri laborkunsidoj (15., 17., 19.5.). Du el ili estis publikaj kaj vizitataj relative bone malgraŭ la forta allogo de la romaj vidindaĵoj. La landa asocio en Bulgario ĉesis resti membro de IFEF pro ŝtata malpermeso transĝiri kotizojn al la IFEF-kaso. La kaŭzo estas manko de valutoj, ne malŝato de Esperanto. En Ĉeĥoslovakio ŝajnas evoluiĝi simila situacio. En Pollando la promesita revigliĝo de IFEF-sekcio ankoraŭ ne realiĝis. Por Rumanio la svedaj gekolegoj pagis ĝis nun la jarkotizojn. Ankaŭ en la Germana Demokrata Respubliko la aliĝo al IFEF ankoraŭ ne efektiviĝis. Aldoniĝas regreso de la membronombroj en okcidentaj landoj, kiu ne povas esti kompensata per sufiĉe da junuloj. Ili aktivas nur en kelkaj landoj. Bonege vizitata estis la tiujara Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno en Grainau/Germanio kaj la lastjara feria semajno en Wengen/Svislando. Reelektiĝis la ĝisnunaj estraranoj, kies prezidanto restis Joachim Gießner/Germanio. Du kongresproponoj flanke de la IFEF-estraro ne trovis la necesan plimulton. La unua celis la ŝanĝon de la titolo en nia organo „Internacia Fervojisto“

en „Fervoja Esperantisto“. Ambaŭ flankoj insistis pri la tradicio. Pri la logiko de la nuna titolo ne montrigiĝis duboj. La alia pli grava kongrespropono koncernis la financon situacion de IFEF. 70% de la enspezoj necesas por la eldono de la IFEF-organo. Pro la rifuzo de la komitato altiĝi la jarkotizon po membro de 12 al 18 danaj kronoj la IFEF-organo aperos nur en reduktita amplekso kaj la jarbuĝeto bezonis novstarigon. Bedaŭrinde ankaŭ la komisiono Varbado kaj Informado (kunsido 15.5.) provizore ne daŭrigos sian laboron. Starigaĵo entute la demando, ĉu la federacio povas multe influi tian laboron en la unopaj landaj asocioj. La Historia Komisiono kunvenis unufoje (15.5.); ĝi daŭrigos sian valoran laboron, kiu kondukos post kelkaj jaroj al eldono de kiel eble plej kompleta historio de IFEF.

Turista programo

Sukcesplena estis la aŭtobusaj rondveturoj komence de la kongreso (14.5.). La eterna urbeo ofertis abundajn vidindaĵojn, ekz. la grandegan bazilikon S. Petro aŭ la gigantan ruinion de la Koloseo, la iaman romian foirejon aŭ la triumfajn arkojn.

Ankaŭ la vizito al la vaticanaj ĝardenoj ebla depost du jaroj sub certaj kondiĉoj (16.5.) kaj la riĉenhavaj vaticanaj muzeoj inkluzive la mondfaman Sikstan Kapelon ĉiujn plene kontentigis. Lertaj gvidant(in)oj estis subtenataj per Esperanto-interpretistoj. Dum tiuj tagoj estis troveblaj multaj kongresanoj en la vidindaj lokoj ekipitaj parte per gvidlibroj.

La internacia balo okazis la 16an en luita diskoteko. Ne senkaŭze la plimulto baldaŭ forlasis ĝin. Oni prefere ne plu ripetu tian aranĝon. Specialan ĝuon promesis kaj plenumis la nokta busveturo tra la lumigita Romo (19.5.). Pri la sekva vizito al nokta klubo ne necesas raporti detale. Laŭdire — ĉar la raportanto ne partoprenis — la tieaj elspezoj estis sufiĉe altaj. Sen kromaj kostoj estis kontraŭe la teatra vespero (15.5.). La geknaboj de elementa lernejo en Cesena rikoltis fortan aplaŭdon pro siaj Esperanto-kantoj kaj du fervore luditaj teatraĵoj „Mi iras kun la katoj“ de Gianni Rodari kaj „La ĵaro“ de Luigi Pirandello. Inter la aktoj surprizigis per du ŝatataj kanzonoj la roma junulo Gianfranco Molle, dum la akordionista ensemblo de la Fervojista Postlabora Organizo en Romo sub la

direkto de la Majstro Modesto Ricchi ludis ekscelente muzikojn de Mascagni, Rossini kaj Auber. Ĝojiga, imitinda vespero.

Sur la scenejo la IFEF-prezidanto Gießner nomumis kiel honormembrojn de IFEF du meritplenajn emeritajn kolegojn: s-ron Poly/Francio kaj s-ron Bürger / Aŭstrio.

Estis projektitaj tri diversaj tuttagaj ekskursoj flanke de la LKK kunlabore kun la vojaĝagentejo CIT, kiu estis transpreninta grandan parton de la preparlaboroj. Fakte okazis du ekskursoj (18. 5.). La plej multaj kongresanoj partoprenis la aŭtobusan ekskurson al lokoj de etruska historio, pri kiu aparta raporto aperas. La resta kvindeko prenis, ankaŭ per aŭtobuso, la vojon al la antikva urbeto Tivoli. Celo estis la vilao d'Este kun ĝiaj famaj 500 fontanoj kaj putoj en belega parko. Bonkvalita tagmanĝo kaj virtuozaj muzikistaro en la belege situanta restoracio de Marteripoli konsolis pri la nevizito al la templo de Hadriano, al la vinurbeto Frascati kaj al Castelgandolfo, kiu nur estis videbla survoje dum halto apud la Albana Lago. La kongreslibro estis promesinta tro multe.

Resumo

IFEF havis la bonŝancon okazigi sian 30an, la jubilean kongreson en unu el la plej belaj urboj de la mondo. Pro tio la partoprenintoj sincere dankas al la LKK, kies membroj estis ĉiam helpopretaj. Certaj mankoj en la organizado priuĝitaj posteriore ne tro gravas. Pli grava estis, ke tiu kongreso demonstris la taŭgecon de Esperanto, ankaŭ sur fervoja medio, ke la laboro de IFEF estas serioze pritaksata de fakuloj, sindikatoj kaj de FISAIC. Dum la malfermo la IFEF-flago iris en la manojn de la finnlandaj kolegoj, kiuj invitis por la 31a IFEF-kongreso al Turku/Finnlando (15. – 21. 6. 1979). Ĝis revido!

W. B.

Etruska Ekskurso

La plimulto de la kongresanoj sekvis dum la tutttagga ekskurso la spurojn de la Etruskoj, tiu mistera gento, pri kiu oni hodiaŭ ne scias, ĉu ili estis italaj indiĝenoj, ĉu ili venis de la nordo, ĉu – plejverŝajne – el Malgrand-Azio. Ili aperis en la 9a

jarcento a. K., iom post iom superigis la teron inter la riveroj Arno kaj Tibero kaj en la 6a jarcento a. K. etendigis sian influon ĝis la provincoj Latio kaj Kampanio, do preskaŭ Napolo. Oni hodiaŭ konas la etruskan alfabeton, scias, ke ili ĉefe skribis de dekstre maldekstren, sed tamen oni ne povas deĉifri la skribitan enhavon krom ĉ. 60 vortoj. Tiujn oni komprenas, ĉar oni trovis 3 orladajn tabulojn, el kiuj du estas dediĉitaj al la diino Astarte kun preskaŭ samaj surskriboj en fenica kaj etruska lingvoj. La Etruskaj flegis viglan komercadon kun Grekoj kaj Kartaganoj, al kies havenurboj ili direktis siajn ŝipojn. Kvankam ilia potenco estis granda, la Etruskaj ne havis unuecan regnolandon, sed ili fondis multajn urboŝtatojn, politike memstarajn, kies 12 plej gravaj formis unuiĝon. La unua etruska gvidanto nomiĝis „Thyrrhenus“, lia nomo postvivis en la nomepito de la Tirena Maro.

Tion kaj multe pli ni jam aŭdis en la aŭtobusoj kiel enkondukon al la baldaŭ montrataj interesajoj. Niaj profesiaj fremdulgvidistinoj havis ĉiurilate profundajn sciojn kaj la diligentaj E-interpretistoj ŝparis nek voĉon nek tempon por informi la interesitojn. Kompreneble ni pro tio ne pretervidis la ĉarman regionon, kiun oni en antaŭaj tempoj senmarĉigis, eĉ helpe de eŭkalipto-arboj. La herbejoj ne estis tiel satverda kiel niaj germanaj en printempo, sed vastaj flortapiŝoj blankaj, flavaj, ruĝaj en diversaj nuancoj jen kaj jen etendiĝis kaj ĝojigis okulojn kaj animojn. Ĉar la etruskaj konstruaĵoj estis plejparte el ligno, ni hodiaŭ apenaŭ havas imagon kiel tiuj homoj loĝis kaj vivis, se ili ne estus postlasintaj siajn tombejojn (nekropolojn), kiuj pruvas eminentan mortulkulton. Vere, la Etruskaj kvazaŭ kopiis sian ĉiutagan vivon kaj respeguligis ĝin en la vastaj mortulurboj. Tiel ni hodiaŭ povas postdesegni ekfloradon, plenprosperon kaj finan descendon de tiu fiera gento.

En la plej malnova nekropoloj, kiujn ni vidis en **Cerveteri** (8a jarcento a. K.) oni trovis put-aŭ fungoformajn, kavajn ŝtonojn, en kiuj iam troviĝis la urnoj de la mortintoj kun aldonitaĵoj, ekz. armiloj kaj nutraĵoj, ĉar la Etruskaj kredis je postmorta vivo. Krome ili signis la tombon per ŝtona dometo, kiam virino estis en ĝi kaj per malgranda kolono, kiam estis viro.

Jam unu jarcenton poste ili elkavigis la subteran kalkan tofon, imitante siajn surterajn lignajn domojn. Komence estis nur unu granda mortulĉambro sub tumulo (kegloforma termonteto super tombo), sed fine de la 6a jarcento a. K. oni fidele kopiis la tutan domon kun Atrio, ĉambroj, antaŭĉambroj kaj vestiblo. Tiel la surtera arkitekturo — pereema ĉar el ligno — eterniĝis en la ŝtono sub la tumuloj. Ju pli riĉa kaj altranga la mortinto, des pli granda kaj abunde ornamita la tombodomo. Ĝi havis lokon por la tuta familio kaj eĉ por la sklavoj. Jen en la ĉefĉambro sur ŝtonaj litoj „dormas“ edzino apud sia edzo (la virino estis do egalrajta kun la viro) kaj en la apudaj ejoj la gefiloj. La antaŭĉambroj ambaŭflanke de la vestiblo estis destinitaj por la servistaro. La ŝtonajn mortuldomojn por nobeluloj oni ekipis same bele kiel iliajn lignajn loĝdomojn en la urbo. La pordoj havis portalsimilajn kadraĵojn, en la muroj estis fenestroj enĉizitaj kaj eĉ la hejma ligna traboplaŝono estis imitita en la ŝtono. Eĉ troviĝas listelaj ornamaĵoj, kolonoj kun belaj kapiteloj volutformaj, kelkaj tomboj estas tute meblitaj (ŝtone) kun foteloj, skabeloj kaj benkoj. La mortintoj estis ĉirkaŭitaj de siaj ĉiutagaj bezonaĵoj: armiloj, juveloj, vazaro, dommastruma ilaro, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kion la Etruskaj materio ne povis aldoni al la tomboj, tion ili prezentis image sur pentritaj bildoj. En Cerveteri tiuj

penetraĵoj pro la pororiĉa kalktofo ne konserviĝis, sed en Tarquinia ni povis admiri la originajn pentromajstraĵojn. Jen oni vidas bankedojn, (denove la virino sidas apud la edzo,) jen muzikistojn kun duobla fluto aŭ liro, jen danĉparojn, batalantojn, rajdantajn ĉasistojn, sed ankaŭ bestojn kiel taŭroj, leonoj, ĉevaloj kaj delfenoj. Ĉiuj freskoj montras graciajn movojn de belaj homoj en vivecaj scenoj. La haŭto de la virinoj plejofte estis blanka, tiu de la viroj bruna. Kiel farbon la Etruskaj uzis i. a. kreton (blanka), karbon (nigra), feroksidon (bruna), lazuriton (blua) kaj malakiton (verda). Supozeble ekzistas ankoraŭ multaj netrovitaj tomboj en la tero ĉirkaŭ Tarquinia. Por sisteme serĉi ilin oni elektre divenas la situon de kavaĵoj subteraj, traboras truan kaj helpe de periskopo kun lampo esploras, ĉu fakte temas pri tombo elfosenda. Kelkajn valorajn tombopentraĵojn post malkovro minacis salpetro. Pro tio oni transplantis la tutan farbtabolon helpe de kemie preparitaj teksaĵoj al la urba muzeo de Tarquinia. Vizito de tiu muzeo, kie oni ekspozicias etruskajn vazojn, amforojn, kandelabrojn, urnojn ktp. el bronzo aŭ fajenco kaj ĉevalparon el oro, estis la finpunkto de tiu vere interesa tuttaga ekskurso. Mense lacaj sed plene kontentaj pri la vere riĉaj novaj ekkonoj ni reatingis Romon.

Elisabeth Ritterspach

La Rektega Fervojo inter Romo kaj Florenco


Resumo pri prelego prezentita dum la 30a IFEF-Kongreso en Romo 1978

La rektlinia distanco inter Romo kaj Florenco estas 232 km, sed la unua fervojo inter la du urboj, malfermita 1866, estis 372 km longa. Ĝi sekvis la Apeninan Montaron tra Orte, Terni, Foligno, Perugia kaj Terontola, la veturo daŭris 10 horojn. En 1867 oni kompletigis duan linion laŭlonge de la Tirena Maro tra Civitavecchia, Grosseto kaj Pisa, 414 km longa. Tria linio kun 316 km, malfermita 1876 kaj ĝis nun la ĉefe ekspluatita, kondukas tra Orte, Orvieto, Chiusi kaj Terontola, evitanta la grandan kurbiĝon

Die „Direttissima“ zwischen Rom und Florenz

Kurzfassung eines Vortrages, der beim 30. IFEF-Kongress in Rom am 17. Mai 1978 in der internationalen Sprache Esperanto gehalten wurde.

Die direkte Entfernung zwischen Rom und Florenz beträgt Luftlinie 232 km, aber die erste, 1866 eröffnete Bahnlinie zwischen beiden Orten war 372 km lang. Sie folgte den Bergen des Apennin über Orte, Terni, Foligno, Perugia und Terontola, die Reise dauerte 10 Stunden. 1867 wurde eine zweite Linie entlang dem Tyrrhenischen Meer fertiggestellt, die mit 414 km Länge über Civitavecchia, Grosseto und Pisa führte. Die dritte Strecke mit 316 km Länge, die bis heute hauptsächlich befahren wird, wurde 1876



de Perugia. Sur tiu ĉi linio aplikiĝas elektra trakcio de 1935, sed malgraŭ diversaj plibonigoj la linio konservis kun kurbigoj de 400 metra radiuso kaj multaj deklivoj tro modestan kvaliton por la kreskanta trafiko (220 trajnoj ĉiutage).

Tute novan kvaran linion kun 254 km (sen la du kapstacioj) oni konkrete ekprojektis 1968; pli ol la duono, nome 138 km, jam nun estas pretaj kaj uzataj, konstruadfino antaŭvideble en 1982. La nova linio servos kaj por rapidaj motortrajnoj kun rapideco de 220 km/h, kaj por rapidtrajnoj kun 180 km/h, kaj por vartrajnoj. Pasaĝertrajnoj gajnos 88 minutojn, la kurbradiusoj estas ne malpli ol 3000 metraj, la maksimuma dekliveco 8 ‰, la distanco inter la du trakaksoj estas 4 m (ĝenerale 3,55 m), por traŭro de eksterordinaraj ŝarĝoj la minimuma distanco ĝis obstakloj estas $3,90 \times 4,70$ m (internacia normo $3,50 \times 4,39$ m). Oni povas ekspluati ambaŭ trakojn en ambaŭ direktoj; survoje ne estas stacioj, ĉe 14 interkomunikaj postenoj eblas transiro de unu trako al la alia. Tie troviĝas ankaŭ trakoj por preterpasoj. En kvin lokoj eblas la transiro inter la nova kaj la malnova linioj.

La ŝpaloj de la nova linio estas ferbetonaj, le reloj pezas 60 kg/m kaj estas surloke elektrike kunvelditaj. La malfavoraj geologiaj kondiĉoj multloke necesigis viaduktojn kun mallongaj spanoj kaj multnombraj pilieroj. La 28 tuneloj kune havas longecon

eröffnet und führt über Orte, Orvieto, Chiusi und Terontola, wodurch der große Bogen über Perugia abgeschnitten wird. Diese Strecke hat seit 1935 elektrische Zugförderung, aber trotz verschiedener Verbesserungen genügt sie mit Kurven von 400 m Radius und zahlreichen Steigungen nicht mehr den Anforderungen des ständig steigenden Verkehrs (täglich 220 Züge). Eine völlig neue, vierte Strecke mit 254 km Länge (ohne die beiden Kopfbahnhöfe) wurde deshalb projiziert, konkret seit 1968. Über die Hälfte, nämlich 138 km, sind bereits fertiggestellt und in Betrieb, Ende der Bauarbeiten vsl. 1982. Die Neubaustrecke wird sowohl dem Schnellverkehr dienen mit Triebzügen von 220 km/h, als auch dem normalen Schnellzugverkehr mit 180 km/h und dem Güterverkehr. Reisezüge werden einen Fahrzeitgewinn von 88 Minuten erzielen, keine Kurve hat einen Radius unter 3000 m, größte Neigung 8 ‰, Abstand zwischen den Gleisachsen 4 m (sonst allgemein 3,55 m); für Sondertransporte beträgt der Abstand zu festen Hindernissen $3,90 \times 4,70$ m (internationale Norm $3,50 \times 4,39$ m). Beide Gleise können in beiden Richtungen befahren werden, die Strecke hat keine Unterwegsbahnhöfe, aber an 14 Blockstellen, die auch Überholgleise haben, ist Gleiswechsel möglich. An weiteren 5 Knotenpunkten ist der Übergang zwischen alter und neuer Strecke möglich.

Die Schwellen der Neubaustrecke sind aus Eisenbeton, die Schienen wiegen 60 kg/m und wurden an Ort und Stelle elektrisch verschweißt. Ungünstige geologische Bedingungen machten zahlreiche Viadukte mit kurzen Spannweiten und

de preskaŭ 75 km, do pli ol 30 % de la linio; la plej longa mezuras 10,9 km. La aparte konstruita katenariontipo kun duobla kontaktodrato por la elektra trakcio (3000 volta kontinua kurento) estas plurloke interligita kun tiu de la malnova linio. La signaliloj fiksjaj konformas al rapideco de 150 km/h, bremsadistanco 1350 m; por rapidecoj ĝis 200 km/h la vojsignaloj ripetigas en la stirejo ĝis la duobla bremsadistanco, kaj pli altajn rapidecojn ĝis 250 km/h nur atingas specialaj motortrajnoj por la kvarobla bremsadistanco. Teleregado de la tuta linio de Roma Termini estas planita.

(La prelegon verkis d-ro Antonio DE SALVO, Romo, surbaze de informoj kaj donitaĵoj de la Dokumenta Servo de la Italiaj Statfervojoj. Ĝin resumis Gernot Ritterspach, sekretario de la Terminara Komisiono; ZVL Mainz, AA 50 05, Basa 954 / 55 33)

Postkongreso en Napoli

Pli ol cent esperantistoj kolektiĝis sur kajo 14 de la stacio Roma Termini sabaton, la 20an de Majo. Post pli ol unuhora atendado du specialaj vagonoj estis je dispono kun sufiĉe da lokoj por ĉiuj.

Du horojn poste la trajno alvenis en Napoli. Venis tieaj kolegoj kaj helpis transporti la valizojn al la koncernaj aŭtobusoj kaj mirakle ĉio atingis bonstate la hotelon.

Dum la rondveturado tra la urbo ni ne povis forlasi la aŭtobusojn, ni ne vidis multon, komprenis nenion, ĉar la klarigoj estis nur en itala lingvo.

Dimanĉon okazis ekskurso al Pompejo. Bonŝance esperantisto tradukis. Impresigaj la restaĵoj pli ol dumiljaraĝaj. Ne estas imagebla la katastrofo, kiu tiun urbon kaj la homojn detruis.

La ekskurso plue kondukis laŭlonge de la marbordo al Amalfi kaj Sorento. Eble tio estas unu el la plej belaj partoj en la lando riĉa je belaĵoj. La deklivoj en multaj terasoj estis plenaj de oranĝkaj citronarboj kaj vitejoj. Vespere ni revenis al Napoli. La lumigita urbo nun estis pli impresiga ol dumtage.

London ni ekveturis al la insulo Capri. La vetero estis nebula kaj ventoblova.

vielen Pfeilern nötig. Die 28 Tunnel haben eine Gesamtlänge von 75 km, also über 30 % der Streckenlänge; das längste Tunnel mißt 10,9 km. Der eigens entwickelte Fahrleitungstyp mit doppeltem Fahrdrat für die elektrische Zuförderung (3000 Volt Gleichstrom) wurde an mehreren Stellen mit der Fahrleitung der alten Strecke gekuppelt. Die ortsfesten Signalanlagen sind auf eine Geschwindigkeit von 150 km/h und 1350 m Bremsweg ausgerichtet; für Geschwindigkeiten bis 200 km/h werden die Signale des doppelten Bremswegs auf dem Führerstand optisch wiederholt, höhere Geschwindigkeiten bis 250 km/h erreichen wegen des vierfachen Bremsweges nur Triebzüge. Die Fernsteuerung der ganzen Strecke von Roma Termini aus ist geplant. (Den Vortrag verfaßte Dr. Antonio DE SALVO, Rom, in Zusammenarbeit mit dem Dokumentationsdienst der FS, original in Esperanto. Kurzfassung und deutsche Übersetzung: Gernot Ritterspach, ZVL Mainz, AA 50 05; Basa 954/55 33.)

Surŝipe ŝanceliĝa planko, la unuaj viktimoj de Neptuno post nelonge estis videblaj . . . En Capri ĉio ŝajnis esti griza, tamen je ĉies ĝojo oni tuj enŝipiĝis al la Blua Groto. La enirejo ŝajnis esti nepre tro malgranda por la boatoj kun tri aŭ kvar personoj, sed ĉiuj kuŝante tamen sukcesis trairi la trueton. Iom post iom oni al kutimiĝis al la malheleco. La akvo montriĝis helblua, kvazaŭ artefarita. Poste la aŭtobuso grimpis al la vilao San Michele, kie ni tagmanĝis. Restis nur horeto por trinki tason da „kapučino“ kaj promeni, tro mallonge por ĝui Anacapri kaj Capri. La reveturo okazis per rapidboato, sen vektimoj de Neptuno. Reveninte de Napoli al la nordo oni troviĝis en malvarmo kaj pluvega vetero. Restas danki al la italiaj geamikoj pro la klopodoj agrablighi al ni la restadon kaj klarigi la vidindaĵojn.

J. Weidacher

Ekzameno

Partoprenontoj anoncu sin plej malfrue ĝis 15. 9. 1978 al s-ro Fritz Lautenbach, D-6400 Fulda, Am Abtstor 21; defore: BAR Lautenbach, Bf 6400 Fulda, telef. 957/822/122.

22a GEFA-Jarkunveno en Bremen

6a ĝis 8a de Oktobro 1978

Sub aŭspicio de la Senatano pri havenoj, ŝipveturado kaj trafiko, sinjoro Oswald Brinkmann.

Informationen

Anmeldeformulare liegen bereit
50 Personen haben sich bereits angemeldet.

Anmeldeschluß

 10. 09. 1978

Bis dahin garantieren wir für gute Zimmer. Es sind in Bremen immer große Kongresse gleichzeitig. Nur bis zum Anmeldeschluß können wir die reservierten Zimmer freihalten.

Empfangsbüro

mitten auf Bahnsteig 1.

Sprachprüfung

Eine günstige Gelegenheit: Es haben sich schon einige Kandidaten angemeldet, darunter die 11jährige Maren (Kursabschlußprüfung). Sie können also in einer großen Gruppe teilnehmen!

Programm: abwechslungsreich und interessant

- außer den Arbeitssitzungen:
- Willkommen bei den Bremer Stadtmusikanten
- Heiterer Abend in einer Braustube neben großem Kupferkessel
- Stadtführung in Esperanto und Deutsch
- Senatsempfang für **alle Teilnehmer**
- Ausflug zum Künstlerdorf Worpswede

– Matinee am Sonntagmorgen
– Das ist noch nicht alles!
Erleben Sie ein angenehmes, herbstliches Wochenende in der entzückenden Hafenstadt BREMEN.

Historio de la Böttcherstrato la sekreta ĉefstrato

Parto de la urbvidado.

La Böttcherstrato (= potfarista strato) estas verko de originalema, ideoriĉa kafokomercisto Ludwig Roselius. Tiu strateto estas kultura centro por ekspozicioj, galerioj, muzeoj – ekzistas artaĵpremio „Böttcherstraße“. Promenante tra la Böttcherstrato, vi certe estas kaptita de tiu ĉarma, mirinda kaj aminda arkitekturo – fantazio kaj esprimoformo ne estis katenitaj. La unua nomo de tiu strateto estis

Informoj

Aliĝiloj haveblaj
ĉe / bei H. D. Hartig, Kasseler Straße 76,
2800 Bremen 1
deĵore: Bw 2800 Bremen Hbf (59)
50 personoj jam aliĝis.

Aliĝimdato

 10. 09. 1978

Ĝis tiam ni garantias pri bonaj ĉambroj. Estas ĉiam gravaj kongresoj samtepe en Bremen. Nur ĝis la limdato ni povas reteni la rezervitajn ĉambrojn.

Akcepteje

estas meze de la kajo 1.

Ekzameno

Bonŝance por vi: Anoncis sin jam kelkaj kandidatoj, inter ili la 11jara Maren (Kursfina Ekzameno). Vi do povas partopreni en granda grupo!

Programo: varia kaj interesa

- krom la laborkunsidoj:
- Bonvenigo ĉe la Bremenaj Urbmuzikantoj
- Gaja kunveno en bierfareja ĉambro apud kupra kaldrono
- Urbgvidado en Esperanto kaj la germana
- Senata akcepteje en la urbdomo por **ĉiuj partoprenantoj.**
- Ekskurso al la artista vilaĝo Worpswede
- Matinea dimanĉmateno
- Tio ne estas ĉio!

Travivu agrablan aŭtunan semajnfino inter Esperantistoj en la ĉarma havenurbo BREMEN.

„Hallingstraat“, pro la tiam proksima ŝipfarejo.

1904 aĉetis Roselius la domo n-ro 6 kaj iom post iom ĉiujn konstruaĵojn de la strateto. Dum 30 jaroj li okupigis artistojn, por ke ili tute novkreis la nun nomitan Böttcherstraton.

La arkitektoj Runge kaj Scotland verkis la dekstran flankon (venante de la foirejo) kaj la maldekstran flankon kreis la skulptisto Hoetger.

1934 la strateto estis inaŭgurita – kaj tuj la kulturpolitikistoj de la Hitlera Reĝimo konmamniss tiun artaĵon. En la milito granda parto estis bombdetruita, sed intertempe oni restaŭris ĉion.



Böttcherstrato

Sur la bildo vi vidas:
Maldekstre: La Paula-Becker-Modersohn-Domo. Ĝi enhavas rimarkindan artgalerion.

Fone: La Robinson-Crusoe-Domo. Jen oni vendas artaĵojn.
Dekstre: La HAG-Domo. HAG estas la firmaa nomo de la kafokomercisto Roselius. Jen oni flaras konstante la freŝan aromon de kafo. Sekvas la Domo-St. Petrus, en kiu viciĝas vendejoj.

En la kortoj vi povas admiri la lertajn manojn de metiistoj: Oraĵistoj, potfaristoj, vitraĵbloistoj kaj aliaj.
Sufiĉas!

Venu mem kaj esploru la „strateton kun koro“ – la Böttcherstraton.

WORPSWEDE

– la celo de nia ekskurso

Kiu volonte migras kaj havas okulojn por la bela naturo estas en Worpswede je la

ĝusta loko. Worpswede situas ĉirkaŭ la sola monteto en tiu marĉeja regiono: la Weyerberg. Weyen = venti; do kunventita monto, aŭ pli bone duno – duno en la pratempa Weser-Rivera valo.

Worpswede signifas arbarmonto.

Dum jarcentoj tiu vilaĝo neatingeble kuŝis en la marĉejo; netuŝita de la militoj kaj aliaj eventoj en la mondo. Nur de la 18a jarcento, la Reĝa Marĉej-Komisiito FINDORFF sekigis kaj kolonigis la regionon, ekestis iom post iom la kontaktoj kun la ĉirkaŭaj urboj Bremen, Osterholz kaj Bremervörde. Fama fariĝis la vilaĝo, kiam 5 artistoj, kiuj forlasis la akademion Düsseldorf pro tedeo, decidis resti en Worpswede. Estis Fritz Mackensen, Otto Modersohn, Hans am Ende, Fritz Overbeck kaj Heinrich Vogeler. Ili fondis la artistan kolonion kaj serĉis sub la vasta ĉielo kun skurilformaj nuboj, sur la malhelbruna marĉejo kaj vastaj paŝtejoj instigojn kaj trankvilecon por labori. Jam post 5 jaroj



Roland-monumento

iliaj verkoj estis laŭditaj en munkena ekspozicio.

Sekvis baldaŭ aliaj artistoj, pentristoj, arkitektoj, skulptistoj, verkistoj. Mi nomas nur kelkajn: Paula Becker-Modersohn, Carl Vinnen, Bernhard Hoetger, Rainer Maria Rilke. Ili formis la vilaĝon Worpswede.

La plej grana mecenato estis Ludwig Roselius, la eltrovinto de la fama kafo HAG. Li konstruigis la kafejon Worpswede kaj la artafekspozician domon. La artgaleriaj ekspursantoj vizitis ambaŭ. Estas multaj ekspozicioj en Worpswede. Vi bezonus tagojn por trankvile rigardi ĉiujn — sed semajnojn vi bezonus por rigardi ĉiun ĉarman angulon en tiu unika regiono.

Malgraŭ la multaj ekspozicioj Worpswede ne estas muzea vilaĝo. Kiu restus nur iom, konstatus la pulsantan vivon. La rekta kontakto kun la artistoj, kiuj loĝas kaj laboras tie (estas momente 300

artistoj), konvinkus vin, ke jen estas nekutime intensa kaj riĉa vivo.

Vi ne nur spertas la arton en Worpswede, sed ankaŭ la belegan, inspirigan regionon. Vi travivas la arĝentbrilajn fosaĵojn, la nigrajn marĉejtruojn kaj la senlimajn paŝtejojn, sur kiuj la vaneloj aerakrobate aktoras. Ĉefe vi spertas la ripozigan silenton, kiu donas forton kaj estas tre saniga.

Dum nia ekskurso ni gvidos trans la Weyerberg al la monumento Niedersachsenstein. Jen vi ĝuos la elrigardon trans la vasta regiono. Ni informos vin pri ĉio rimarkinda.

Ni daŭrigu la promenadon laŭ neimageble bela vojo kun konstante ŝanĝigantaj impresoj.

Ni estas feliĉaj povi montri al vi tian naturspektaklon.

La fino de la ekskurso por ambaŭ grupoj estos la ĝuo de kafo kaj torto en kampara domo. Hg

Aus den Gruppen

Frankfurt/Main:

Auf Rhein-Main: Mit dem Zug zum Flug. Im Terminal des Frankfurter Flughafens zeigte die DB im Rahmen der Schau „Mit dem Zug zum Flug“ vom 7. 4. bis 7. 5. 1978 u. a. interessante Kurzfilme und eine große Modelleisenbahn. Im Sonderpostamt wurde eine Esperanto-Briefmarkenausstellung unseres Mitgliedes Mager, HVB, der Öffentlichkeit vorgestellt. Bereits 1976 erhielt Herr Mager für seinen Beitrag „Esperanto“ in Saarbrücken von der FISAIC und im gleichen Jahr bei der Briefmarken-Weltausstellung in Kopenhagen hohe Auszeichnungen. GEFA gratuliert seinem langjährigen Mitglied für diese erneuten Erfolge.

Münster: La E-istoj el Münster kaj ĉirkaŭo havis la bonŝancon kombini kun la kutima majekurso prezentaĵon de la Pola Esperanto-Teatro. Antaŭtagmeze Kalina Pienkiewicz kaj Zbiŝko Dobrzynski prezentis ilian novan teatraĵon „Hipnoto“ kun samentuziasma aplaŭdo kiel antaŭ kvar jaroj la konatan „Proksima nekonato“. Perfekte la aktoroj ludis ĉiujn registrojn de ilia sonampleksa organo — de sentema Piano ĝis Agitato eksploda, profunde problema kaj samtempe ĉarme humura — kaj tiel dum 2 horoj ili ne ellasis la spektantojn el ilia magia hipnoto.

Tuj poste komenciĝis 15 km longa majmigrado, kiun partoprenis ĉ. 30 (junaj kaj male) el la spektintoj, kune (!) kun la aktorintoj. Sub modesta sunlumo oni marŝadis tra bela „münsterlanda park-pejzaĝo“ ĝis arbar-herbejo, kie atendis opulenta piknika tagmanĝo. Post meritita ripozo, ne sen muziko, kantado kaj ridado, oni denove ekmarŝis al Telgte (bela pilgrima urbeto), kie oni ĝuis lastan restadon en plaĉa, iom kampara kafeo. Je la dekoka reveturigis trajno la lacajn, sed gajajn „pilgrimojn“ hejmen. Memorinda tago!

Hannover/Bremen

Jarkunveno 1978

Senatoro Oswald Brinkmann aŭspicias nian jarkunvenon en Oktobro. La estanta stato de la preparoj kaj de la diskutoj kun oficejoj k.t.p. pri nia aranĝo estas kontentiga. Precipe por la informvespero ni luprenis belegan salomon en la „Stadtwaage“.

Berichtigung zum Anschriftenverzeichnis

(Bulteno 1/1978):

Arkivo: BHS Barmaneter, Bf 8940 Memmingen (BD München); Basa 912/864/394
Fakterminaroj: HLokf Hartig, Bw Bremen Hbf; Basa 949/832/365

BD Essen: TBOS Retzlaff, BD Essen, T-Büro, Tb 47 — Gruppe Brückenbau momente sen telefono).

Redaktfino por n-ro 4/1978 estas la 20. 8. 1978

W. L. van Leeuwen —
„Ridder in de Orde van Oranje Nassau“
 La 28an de Aprilo 1978 la vicprezidanto de IFEF, Wim L. van Leeuwen, ricevis ordenon de Sia Moŝto Juliana, reĝino de Nederlando. Ĉeestis proksimume 80 personoj en aparta salono de la centra stadidomo de Amsterdam, kiam la distriktestro nome de la reĝino transdonis al nia amiko van Leeuwen la reĝan distingajon. En solena kadro S-ro. de Rooij prezentis la personecon de van Leeuwen, desegnis klaran bildon pri tia deĵora agado, lia daŭra helpopreteco kaj speciale substrekis la longjaran laboron por la Esperanto-movado sur fervojfaka tereno. Li ankaŭ agnoskis la gravan subtenon flanke de edzino Metje van Leeuwen. Por la ĉeestantantaj esperantistoj li trovis esperantlingve afablajn vortojn.
 GEFA tuktore gratulas por la honorigo kaj deziras al la geamikoj van Leeuwen ĉion bonan.

E.Kruse

GEFA-Archiv

Nur wenige kennen die Dokumentations-Sammlung in Memmingen, die seit vielen Jahren von unserem Kollegen Barmaneter mustergültig betreut wird. Zeitungsausschnitte über Esperanto, Esperantoveranstaltungen und Kongreßunterlagen werden hier gesammelt und für geschichtliche Rückblicke aufbewahrt. Wenn Sie zur Vervollständigung beitragen wollen, senden Sie Esperanto-Unterlagen nach Memmingen zur Aufbewahrung. Die genaue Anschrift finden Sie an anderer Stelle dieses Bultenos.

lo pri la feria centro en Danio

Kiam vi serĉas trankvilan kaj ripozigan ferio-lokon apudmaran, iru al Danio. Mi vere povas tion rekomendi al vi. Proksime de la stacio Hjørring en Jutlando troviĝas la vilaĝo Ulstrup. De tie nur estas kelkaj kilometroj ĝis al via restadejo. En Ulstrup atendas vin Anton Jensen, jam delonge esperantisto. Li konstruis novan domon en sia bieno, en ties 1a etaĝo troviĝas 4 ĉambroj por gastoj, krome kuirejo kaj aparta ĉambro por manĝi aŭ restadi. La bieno situas tre proksime ĉe la okcidenta marbordo de Norda Jutlando (Skagerrak). Ĝi havas tre belan larĝan strandon. Precipe familioj kun infanoj tie trovos paradizon. La prezo estas modesta:

Malgranda ĉambro

por 2 personoj

50,— Dkr potage

Granda ĉambro

por 2 personoj 60,— Dkr potage
 Krompageo por infanoj
 ĝis 12 jaroj = 15 Dkr potage.
 Luo de litaĵoj = 15,— Dkr por maksimume 14 tagoj.

Por tiuj malaltaj prezoj vi havas la samajn eblecojn kiel en ordinara somera domo, por kiu vi devas pagi pli ol la duoblan sumon.

Se vi bezonas pliajn informojn, bonvolu skribi al:

H. Hauge - Tolne station - DK 9891 Tolne

E. Kruse

Sitzung des Arbeitsausschusses Esperanto mit den Bezirksbeauftragten und den Beauftragten für Sonderaufgaben am 15. 4. 1978 in Frankfurt/Main

Die Arbeitssitzung wurde mit einem Kurzbericht des Beauftragten eröffnet. Im Berichtszeitraum mußten wir eine außergewöhnlich hohe Zahl von Abgängen durch das Ableben langjähriger Mitglieder verzeichnen. Trotz erfolgreicher Werbung — einige Bezirke haben hierbei beachtenswerte Aktivitäten gezeigt — konnten die eingegangenen Neuanmeldungen die Zahl der Mitglieder nicht mehr auffüllen. Neue Ideen zur Mitgliederwerbung, evtl. in Verbindung mit einem Wettbewerb, sollen bei der Jahresversammlung in Bremen vom Beauftragten vorgelegt werden.

Die Tagesordnung und die Kongreßvorschläge für den Kongreß in Rom wurden besprochen. Die 5 stimmberechtigten Mitglieder für die Arbeitssitzungen im Rahmen des 30. Internationalen Eisenbahner Esperanto-Kongresses wurden bestimmt und dem Verband gemeldet.

Der Bezirk Essen übernimmt die Ausrichtung des Altentreffens, das voraussichtlich am 9. 9. 1978 in Dortmund stattfinden soll. Für 1979 hat sich der Bezirk Frankfurt/Main bereit erklärt und nach Fulda eingeladen.

Die Vorbereitungen für die diesjährige Jahresversammlung in Bremen vom 6. — 8. 10. sind zum größten Teil abgeschlossen. Die Anmeldevordrucke und die Karten für die Zimmerbestellungen wurden mit Bulteno 2/1978 verteilt. Mehrbedarf ist bei den Bezirksbeauftragten anzufordern. Zur Jahresversammlung 1979 hat der Bezirk Stuttgart bereits seine Bereitschaft zur Ausrichtung erklärt. Die Veranstaltung wird vom 5. — 7. 10. in Heilbronn durchgeführt. Wahrscheinlich wird der Bezirk Karlsruhe für 1980 einladen.